

La Suda Kruc

Oficiala Organo de la Australasian Esperanto Association.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penceoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 penceoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 14. Melburno (*Melbourne*), Australio.

10 Aŭgusto, 1921.

La Unua Sci'go el la Kongreso.

Kabla depeŝo informas nin, ke 2700 delegitoj ĉeestis, el 40 nacioj. Sep delegitoj estis rajtigataj de siaj registaroj. D-ro Nitobe, japano, kiu estis reprezentanto de sia lando ĉe la Ligo de Nacioj, diris, ke internacia lingvo estas pli grava, ol ia alia afero. Li sopiras al la tempo, kiam la pacerkantoj el ĉiuj nacioj trovos komunan lingvon. Oni raportas, ke la naciaj kostumoj portataj de la delegitoj, faris tre imponan kaj pitoreskan scenon en la kongresa salono.

French Scientists Advocate Esperanto.

A majority of the members of the French Academy of Sciences have issued the following important manifesto:—

The undersigned, members of the Academy of Sciences, being convinced that the adoption of the auxiliary language, Esperanto, in international relations, would have results of immeasurable importance in relation to the progress of the sciences and their application, that it would facilitate the dissemination of French science in other countries and thereby extend the intellectual influence of our land, express the desire: (1) That the teaching of Esperanto, a masterpiece of logic and simplicity, should be introduced, at least as an optional

subject, in the official programmes of the science classes of all schools; (2) that in international congresses it should be accepted as an official language, with the same rights as national languages, until the time when experience shows it to be desirable that it should be their sole language; (3) that the attention of scientific and technical publishing firms be drawn to the interest that would be aroused by the use of this language in the publications destined for foreign circulation; (4) that from the present time scientists and technicians should prepare themselves to use it in their relations with their foreign colleagues, and afterwards inform them that they are ready to use it; (5) that a commission be elected to prepare a dictionary of the pure sciences in Esperanto, and that the technical societies be urged to do the same with reference to the various technical processes.

D'Arsonval, Professor of Physiology, College de France.

Daniel Berthelot, President of the French Education League and of the Society of Aerial Navigation.

Bigourdan, Astronomer, of the Paris Observatory.

Gaston Bonnier, Professor of Botany at the Sorbonne.

General Bourgeois, Senator, late Director of the Army Geographic Service.

C. Breton, Deputy—a former Minister.

J. Carpentier, scientific instrument maker.

Charpy, Director-General of the Societies of Iron and Steel Founders of the Navy, at Homecourt.

Costantin, Professor of Botany at the Museum of Natural History.

Deslandres, Director of the Astronomical Observatory at Meudon.

Amiral Fournier, President of the French Oceanographic Society.

P. Janet, Director of the Central Laboratory of Electricity, President of the French Society of Physics.

C. Lallemand, Inspector-General of Mines.

Maurice Leblanc, President of the International Electro-technical Committee.

Iecornu, Inspector-General of Mines, Professor at the Polytechnic School.

Lindet, Professor at the Agricultural Institute.

Lumiere, Manager of the Lumiere Establishments at Lyons.

Prince de Monaco, President of the Oceanographic Section of the International Union of Geodesy.

Charles Richet, Professor of Medicine.

General Sebert, President of the Council of Administration of Foundries of the Mediterranean.

Fernand Widal, Professor of Medicine.

Kroniko.

Koburgo, V.—La loka grupo de la Politika Laborista Konsilantaro starigis kurson. Dek personoj partoprenas, inter kiuj troviĝas ses infanoj. S-ino Hanks estas la instruanto.

Komerca Esperanto Klubo, V.—Tiu ĉi klubo ne kunvenos ĝis la fino de la nuna jaro. Oni diras, ke la klubo havas 60 membrojn kaj ke 30 aliaj Esperantistoj deziras aliĝi, tial estas rimarkinde ke ili ne tuj aranĝas pri regula kunveno.

Sidnejo, N.S.-K.—La kvara monata parolado kaj koncerto de la Sidneja Societo, okazis, la 15an de la nuna. S-ro E. Dash, B.A., la prezidanto de la Asocio de Publikaj Lernejoj Instruistoj, prezidis. Krom parolado de S-ro J. N. Edmonds (Boys' High School, Norda Sidnejo), estis muzikaĵoj kaj Esperanta drameto, "La Dormanta Belulino."

A.E.A. Council Meeting.

A meeting was held in Melbourne on 5th August. Eight members were present. Two auditors were appointed. The annual report was presented and accepted. It was resolved "That all previous decisions with regard to the appointment of a Board of Examiners be cancelled, and the fresh nominations be called, closing 1st October, 1921." The Sydney proposal, "That the proposed amendment of the constitution, signed by Sydney and Melbourne members, be forwarded to all affiliated groups, and the date of the annual meeting arranged to take place 30 days later," was unanimously rejected. The affiliation of the Belgrave (Vic.) group was accepted. It was reported that the transfer of the management of the "Suda KrucO" had been successfully arranged. It was resolved that the Editor, Sub-editor, the President of the Association, and the Journal Secretary should be responsible for the conduct of the journal, and that the accounts of the "Suda KrucO" should be kept distinct from those of the Association. It was resolved that a letter be sent to the Red Cross Society placing the services of the Association at its disposal. It was decided to complete arrangements for the annual ball and that candidates for the forthcoming State Parliamentary election should be circularised regarding Esperanto. The date of the Annual General Meeting was fixed for 2nd September next.

Pri la Propraj Nomoj.

Al Internacia Komerca Revuo neplaĉas nia uzo de "Melburno" ("Sidnejo" (— "Melbourne" "Sidnejo") kaj demandas, kiel ne anstataŭ "Ĝilongo" (— Geelong), "Kraja ĉorĉo" (— Christchurch). Nia uzo de Melburno, Sidnejo, Adelejo (— Adelaide), Brisbano (— Brisbane), Perto (— Perth), Hobarto (— Hobart) estas laŭ la jam de longa ordinara kutimo de verkistoj kaj gazetistoj doni Esperantan formon al la ĉefurboj de landoj, ekz: Londono, Parizo, Varsovio, Vieno, kaj ĝis la Akademio faros konsilon, ne skribi la proprajn nomojn, estas kontraŭkonformigi sian uzon al la kutimo.

Artikoloj verkitaj de D-ro Zamenhof mem en la "Fundamenta Krestomatio."

En la antaŭparolo de la "Fundamenta Krestomatio" D-ro Zamenhof diras: "Ĉiuj artikoloj... estas aŭ skribitaj de mi mem, aŭ — se ili estas skribitaj de aliaj personoj — ili estas korektitaj de mi en tia grado, ke la stilo en ili ne deflankigu de la stilo, kiun mi mem uzas."

Tio ĉi nin certigas, ke ĉiuj artikoloj en la libro estas skribitaj en tute Zamenhova stilo. La legantoj tamen sendube ĝojos sciigi, kiu nome el la krestomatiaj artikoloj estas verkitaj de D-ro Zamenhof. Jen sekvas ilia titolaro, kiun iam afable sendis al "Lingvo Internacia" ilia aŭtoro mem (Decembro 1906):

"Ekzercoj;

"La novaj vestoj de la reĝo;

"La virineto de maro;

"Anekdotoj (pliparte de mi);

"La hejmo de la metiisto;

"La karaj braceletoj;

"Bagateloj (pliparte de mi);

"Fingra kalendaro;

"El la poŝto;

"La loĝejoj de la termitoj;

"Kronika katarata konjunktivito;

"El la unua libro de la lingvo Esperanto;

"Plena gramatiko de Esperanto;

"Al la historio de la provoj de lingvoj tutmondaĵ de Leibnitz ĝis la nuna tempo;

"Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia."

El tio ĉi oni vidas, ke la lasta grava artikolo "Esenco kaj estonteco..." iam aparte represita sub la modesta pseŭdonimo "Unuel," eliris el la plumo de la aŭtoro de Esperanto. Eĉ sen tia sciigo ĉiu sperta esperantisto jam de longe rekonis ĝian belan Zamenhofecon.

Here and There.

In Sofia, Bulgaria, Esperanto has been made a required subject in the five months course for teachers. Eighty students are taking part; S-ro Atanasof is the Esperanto instructor.

At Cremona, Italy, the Esperantist group arranged a public meeting in the largest theatre, and the thousands of citizens there gathered, having heard of the progress of Es-

peranto, unanimously voted a petition that Esperanto be introduced in the public schools.

In the first of May demonstration in Hyde Park, London, a miner and a railway man presented Esperanto from the viewpoint of the proletariat.

Besides the obligatory courses at Geneva in the 7th grade, La Chaux des Fonds, Sev., is to have official courses in the two upper grades.

Louise Briggs has taken first prize in the Brita Literatura kaj Debata contest for 1921, as in 1920, with her translation of Tennyson's "Passing of Arthur." This will probably be published in the December issue of "Literaturo."

An Esperantist office has been opened at 38 rue Consolat, Marseilles, France. It aims to give all information on commercial and other matters, to receive visiting Esperantists, and to sell Esperantaĵoj of all descriptions.

The Chamber of Commerce of Reichenberg, Czechoslovakia, by letter of 2nd March, has announced its entire sympathy with the Esperanto movement and its readiness to accept and answer any commercial correspondence in that language.

The entire postal personnel of the free state of Danzig was officially invited by Postmaster-General Zander to a lecture on Esperanto in the chief post office. Some 150 attended, and a course of 60 has started.

In Venice, acting at the recommendation of the Italian Ministry of Marine, Prof. Pizzi has opened a free course with over 100 pupils.

In the past year some 20,000 Esperanto textbooks were sold in Finland. The government permits the use of Esperanto in telegrams, and delegates of the U.E.A. may hang up signs in post offices and railroad stations.

Esperanto during 1920 was taught in 22 German public schools.

"The Australasian Manufacturer" of 23rd July, contains a letter from our active Samideano, L. E. Pfahl, quoting names of international fairs using Esperanto for their foreign advertisements.

Deziras korespondantojn en Aŭstralio, S-ro K. Pinger, Leipzig, Lind Lützschner str. 45 III, Germanujo.

El la Redaktejo.

Ni forte deziras, ke la Sudo Kruco, krom kunligante la Aŭstralaziajn esperantistojn estu por la aliaj mondpartoj vera informilo pri iuj pure Aŭstralaziaj aferoj freŝdate. Ĉi monate ni presigas informojn pri la lasta ludo kaj la Glacia Epoko, kaj estas pretaj ricevi kaj konsideri similajn paragrafojn por estonta uzo. Ĉi tie ni volas diri, ke ĉiu artikolo, se ĝi ne estas rekte malpermesata, povas esti represita aŭ tradukita sen plua permeso, sed pro ĝentileco represigantoj bonvolu citi la fonton de siaj ĉerpajoj.

La Nuna Esperantista Devo.

Aperis antaŭ nelonge en Esperanta gazeto, letero de samideano, kiu plendas ke "la ordinarulo ne sufiĉe uzas la lingvon por originala verkado," kaj diras ke "nura tradukoniel plene kaj kontentige anstataŭas tian uzadon." Radike, ĉi tiu plendo estas bona, ĉar ĝi deziras, ke ĉiu Esperantisto aldonu ion al la literaturo Esperanta.

Necese estas havi grandegan verkaron, ĉar alie, lingvo ne estas lingvo. Kiu Esperantisto, kiam li penis konvinki necesperantiston, ne aŭdis "sed ne ekzistas Esperanta literaturo"? Certe tio montras, ke la ordinara homo pensas, ke vera lingvo ne povas esti senliteratura. Ankaŭ la literaturo estas la plej utila ilo por atingi la Esperantan celon. Lingvo, ĉu parolata, ĉu skribata ebligas la interŝanĝadon de homaj pensoj, kaj Esperanto taŭgas por tio, same kiel naciaj lingvoj, sed ĝia utileco estas iom nesimila. Nacian lingvon oni parolas pli ol oni legas, ĉar oni renkontas samlandanojn kaj samlingvulojn, kaj kun ili interŝanĝas ideojn; sed la Esperantisto legas kaj skribas, pli ol li parolas Esperante, ĉar ofte li ne renkontas siajn Esperantajn amikojn kaj konsekvence ne povas paroli al ili. Sed literature, nacioj renkontas naciojn, kaj la homaro ĝuas la verkon de unu homo. Kio estas literaturo? Ĝi ampleksas aliajn verkojn krom romanoj, dramoj kaj poemoj: estas loko por verkoj pri temoj sociaj, scienciaj kaj komercaj. La vera literaturo, ĉu Esperante, ĉu nacilingve verkita, kiel la vera genio, estas tutmonda, interesas la tutan homaron. Nu, ĉiuj

tutmondaĵoj apartenas al Esperanto la tuta literaturo apartenas al ĝi. Se la literaturo estas ankoraŭ nacia lingvo, la plimulto da homoj senigitaj, ne ĝuas ĝin, kaj Esperanto kvankam ĝin posedante, ne havas ĝin. Se oni Esperante kreas literaturon, la homaro tuj havas novajn kaj tiamaniere la literaturo Esperanto kreskas. Verki ion por homaro estas do la devedo de ĉi fidelaj Esperantistoj, kaj la tradukantoj, kiu malfermas la pordojn al nacioj, ne aldonas malpli ol originala Esperante verkanto.

La plendanta samideano deziras la "ordinarulo" verku originala. Sed ŝajnas, ke la traduko estas speco de verko plej taŭga por tiu kiuj, lerninte la gramatikon kaj ion da vortoj, akiras pli grandan vortaron kaj pli bonan stilon (ĉar tiun ni povas nomi la "ordinarulo"). La tradukanto devas diri Esperante la tutajn signifon de sia tradukotaĵo; li devas aŭ forlasi iun nuancon en la originala verko, aŭ iun novan enmeti en sian tradukon. Plue, li devas eviti frazojn kiujn ne komprenus alilandaj Esperantistoj, kaj li devas kiel plej eble zorgi la stilon. Oni konsentos, do, ke la scienco de la tradukado estas tre ekzakta kaj postulema. Poste lante ĉiam la ĝustan vorton, ekzercas la vortaron de la tradukanto; same la frazoj ekzercas liajn kapablecon glate esprimi difinitajn signifon. El la tradukantoj de ĉi tiu grupo devenos la estontaj majstroj de la stilo Esperanta, kaj certe, tie instruite, ili ne malbonigos ĝin. Kontraŭe tiu Esperantisto originala verkante, nature evitas la plej grandajn malfacilaĵojn; lia penso estas ankoraŭ nedifinita, kaj li forlasas la nuancojn kiujn, tradukante, li enmetus. Tiel lia stilo ne sufiĉe montras la kapablecon de Esperantisto kaj la literaturo suferas.

Sed la majstroj de la lingvo devas celi pli alte. Sendube la tradukanto ĉiam estos por ili tre utila, sed originale verki en Esperanto donas al ili alian metodon por pligrandigi la literaturon kaj por ekspluati la stilon. La precizeco de la tradukotaĵo estas bona por la ordinarulo sed por la superanto ĝi fariĝas difektobridante la liberecon, ĉar de la lingvaj majstroj (kiu estas lernintoj) la precizeco per tradukado naskiĝas ĉiam diversaj kaj ampleksaj

stiloj. Tia kompetenteco devas esti la celo de ĉiuj Esperantistoj, sed por la bono de Esperanto, oni devas tiel verki nur post traduka preparado. Sed, intertempe, ĉiuj faru ion; la ordinario pligrandigu la literaturon per traduko, sin preparante por pligrandigoj, la majstro per originala verko; precipe, ĉiu senprokraste skribu.

Gazetoj Ricevitaj.

Amerika Esperantisto, (Boston), Aprila, Maja, Junia. La tuta aprila kajero estas dediĉata al Historio de la Propatroj Pilgrimaj. En junia kajero aperas interesa letero de Usonano, kiu deĵoris en Siberio kaj kiu atestas al la utileco de Esperanto por vojaĝantoj.

Kataluna Esperantisto, (Barcelona), junia kajero enhavas tradukon de historieto de Maeterlinck, "Pri la morto de hundeto."

Esperanta Finnlando, Helsinko, Maja, Junia. Ilustrita artikolo pri Helsinko; same pri Tallinn.

Kristana Espero, Laihia, Finnlando. Marta-Aprila. Multaj interesaj artikoloj pri religiaj temoj.

Verda Utopio, Osaka, Maja kajero, enhavas sceno el Japana dramo.

La Revuo Orienta, Tokio, Aprila numero, pleje Japanlingve.

La Verda Ombro, Taihoku, Maja kajero.

La Unuigita Tuthomaro, Hamburg, Maja-Junia.

Itala Esperantisto, Milan, Maja numero.

Esperantista Laboristo, Paris, Junia numero. Sekvo de bona artikolo pri Organizado esperantista.

La Esperantisto, Vienna, Aprila-Maja numero.

Literaturo, Wembley, Anglujo, Aprila-Junia numero. Bonaj originalaĵoj kaj tradukoj. Ĉiu vorto estas leginda.

Respondoj al Korespondantoj.

F.T.R.McA.—Dankon por via laŭdo. Via kontribuado ne plene taŭgas. Eble estos pli bona ŝanco por vi proksiman fojon.

S.F.N.—La poezio, simile al Amo, estas kaprica diŝo. Sen ofendo, ni konsilas vin verki multe da prozo, antaŭ ol sopiri al la altaĵoj de poezio.

B.K.B.—Ni estas tre kontentaj pro viaj aprobaj vortoj.

"Lingvo Internacia" Forpasas.

Sub la dato, decembro 1920, aperis ekzemplero de "Lingvo Internacia." Ĝi reprezentas kvin numerojn, kiuj kompletigas la jarkolekton 1914! Niaj abonantoj, kiuj tiel forte plendis pri la malgranda prokrasto je nia julia kajero bonvolu noti!

Post ekzistado de dek naŭ jaroj, tiu bona gazeto nun devas malaperi, ĉar ĝi ne ricevis sufiĉe multajn promesabonojn por certigi ĝian pluan vivon. Doktoro Zamenhof iam diris, ke, laŭ lia opinio, "Lingvo Internacia" estas la plej bone verkita el ĉiuj esperantaj gazetoj; kaj tiuj, kiuj rememoras la belajn literaturaĵojn, kiuj tiel bone ornamis ĝiajn paĝojn, kun li konsentos. Ni tre esperas, ke la talentoplenaj verkistoj, kiuj laboris tiel efike por "Lingvo Internacia," verkos por la ekzistantaj gazetoj ĝis venos la tempo kiam "Lingvo Internacia" estos ree starigata. Ke baldaŭ venu, tiu tempo!

La Disigitaj.

Ne skribu! Mi malgajas kaj volus min estingi;
La belsomero estas, sen vi, amad' sen flamo.

Mi fermis brakojn, kiuj ne povas vin atingi;

Kaj frapi mian koron, aŭ tombon, estas samo.

Ne skribu!

Ne skribu! Tuforgesu ni unu pri alia;

Demandu vin kaj Dion pri mia koro-sopiro;

Ke vi min amas, aŭdi tra silentado via,

Ĉiel' — aŭskulto estas, neniam ĉieliro.

Ne skribu!

Ne skribu! Mi vin timas, mi timas la memoron

De via klara voĉo, min ofte alvokanta;

Al ne povanto trinki ne montru vivlikvoron;

Sribajo kara estas portreto plenvivanta.

Ne skribu!

Ne skribu! Du vortetojn mi legi ne kuraĝas;

Kaj ŝajne voĉo ilin al mia koro murmuras,

Kaj tra rideto via brilante ili naĝas, kaj ŝajne kiso ilin sur mia koro gravuras.

Ne skribu!

A. Grabowski.

Glacia Epoko en Australio.

Granda, rondforma ŝtono, strange skrapita, kaj sulkita per linioj, kiuj aspektas kvazaŭ faritaj de ŝtala kom-bilo estis inter la pezaj geologiaj trezoroj, kiujn profesoro Kavaliro Edgeworth David, el Sidnejo, kun-portis al Melburno post nelongedaŭra esplorada ekskurso en la centraj ebenaĵoj de Aŭstralio, norde de Oodnadatta. La ŝtono tute ne estas impona por la laikoj. La ordinara homo estus forjetinta ĝin el sia pakajo ĉe la unua konvena loko. Sed al la geologiistoj tio prezentas trajtojn treege interesajn. Ĝi estas ligilo kun tiu epoko, antaŭ milionoj da jaroj, kiam grandegaj amasoj de glacio—similaj al la glacimontoj kaj flosanta glacio—de la polusaj regionaj—kuŝis sur tre granda parto de la kontinento, kaj etendis ĝis la centro mem, kaj pli malproksimen. La ŝajne sensignifaj skrapoj estas la markoj de grincadaj amasoj da glacio. Tamen, la ŝtono estis trovita sur ebenaĵo, kiu nuntempe ofte estas centro de brulega varmo, kaj turniĝantaj varmegaj, sablaj ventegoj.

La sciencularo, kiu plenumis la lastatempajn ekskursojn, konsistis el Profesoro David, Profesoro W. How-chin, el Adelaido, kaj Kapitano S. A. White, ornitologo kaj botanisto. La du unuaj estis speciale elektitaj de la Australasia Asocio por la Antaŭenigo de la Scienco, por konduki la elserĉadan laboron rilate al la esploro de ĉi tiuj glaciaj fenomenoj kaj geologiaj postsignoj de la glacio epoko. Raportoj, ke oni povas trovi ĉi tiujn fenomenojn, estis faritaj antaŭ kelke da jaroj de profesoro Kavaliro Baldwin Spencer, sed oni sciigis entute tre malmulton pri ili. La demetaĵoj sin trovas ĉe Yellow Cliff (Flava Krutaĵo) kaj Dalhousie, kaj la eltrovaĵoj faritaj de la elserĉada kunularo estos gravaj por geologiistoj kaj scienculoj ĝenerale,

ĉar ili promesas ĵeti novan lumon sur la movadon de la glacio, kaj eble sur la glacialan periodon.

Profesoro David, parolante pri la ekspedicio, priskribis pri tiuj glaciaj pokaj fenomenoj, ke ili estas grandioze vastaj kaj treege imponaj speciale en la najbaraĵo de Yellow Cliff. Striitaj aŭ sulkitaj ŝtonegoj kaj rokoj signitaj de glacio estis trovitaj abunde de la sciencularo; kaj estis eble vidi, kiel grandaj amasoj da rokoj estis plugitaj de la moviĝanta glacio. Entute, la pruvoj de glacia agado estas eksterordinare imponaj. Profesoro David konstatare ke eĉ ĉe la Sud-Polusaj esploradoj, pri kiuj li kaj Kavaliro Douglas Mawson sin okupis, neniam postsignoj de glacia agado estis, li kredis, viditaj tiel grandamase kiel tiuj trovitaj sur ĉi tiuj aŭstraliaj plataĵoj, kiuj, en pasintaj epokoj, verŝajne estis neokupitaj etendaĵoj el dika glaciato. Entute, oni konsideras, ke le rezultatoj de la ekspedicio estas tre kontentigaj, konsiderante ke ĝi okupis nur ĉirkaŭ tri semajnojn, kaj dum tiu tempo ĉirkaŭ 400 mejloj estis trapasitaj en veturileto.

Dum la ekspedicio, speciala atento estis donata de la sciencistoj ankaŭ al la geologiaj fenomenoj kunrilataj al la arteza kavaĵo. En la estinteco oni tre diskutis pri la fonto de la akvo, kiu kuŝas sub la ebenaĵo en ĉi tiu kavaĵo, kaj kiu eble estus ating-ebla per borilo. Laŭ profesoro David, tiuj geologiistoj opinias ke la akvo kiu venas el la arteza bortruoj kaj el naturaj elirejoj tiaj, kiaj ŝlimfontoj, estas de profundiginta deveno. Aliaj geologiistoj opinias ke la fonto de la akvo estas pluvo, kiu falis rekte sur la poran sabloŝtonon kiu ĉirkaŭas la randon de la kavaĵo, aŭ pluvo, kiu, en la formo de rivereto aŭ rivera akvo, fluas sur la pora supraĵo kaj en-sorbiĝas per filtrado en la pli profundan parton de la kavaĵo. Pruvoj akiritaj

HAROLDO PUDNEY Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

de la sciencularo dum la ekspedicio montris ke ekzistas vasta areo da sabloŝtono sur la okcidenta flanko de la arteza kavaĵo de la kuniĝo de la rivero Finke kun la rivero Goyder. La fakto ke ĉi tiuj sabloŝtonoj estas tre molaj kaj porecaj, kaj, ke grandaj riveroj tiaj, kiaj estas la rivero Finke kaj la rivero Stevenson fluas sur ilia supraĵo portante grandajn kvantojn da akvo post densa pluvo, montras ke gravaj fontoj de provizo al la okcidenta flanko de la arteza kavaĵo certe venas el ĉi tiuj riveroj. Sendube estas, ke akvo grandkvante al la okcidenta flanko envenas de la areo inter la montaroj Musgrave kaj la montaroj M'Donnell. Profesoro David opinias, ke sen ia dubo ekzistas grandaj eblecoj akiri bonajn provizojn da subearteza akvo, norde de Charlotte Waters kaj en direkto al Hergott Springs, nun nomata Maree Springs.

Pruvita estas la fakto, ke ĉi tiu akvo estas altevalora por la kulturado de unuaklasaj legumoj. La ekspedicio havis la okazon por vidi kiel ĉi tiuj centraj ebenaĵoj povas restatigi kaj prosperi kiam saturitaj per akvo. Ĉe Charlotte Waters (Charlotte Akvo), kie la ordinara pluvfalo estas ĉirkaŭ 3½ colojn jare, estis pluvfalo de ne malpli ol 20 colojn en dek ok monatoj. Tiu estas la plej granda pluvfalo en kvardek jaroj. Lokoj, kiuj ordinare estis sekigitaj de varmegaj ventoj kaj sabloventoj, estas kovrataj de herboj kaj vegetaĵoj. La sablomontetoj estas firmigitaj de abunda kaj forta vegetaĵo, kaj estas helkoloraj per indiĝenaj floroj, kiujn la scienculoj kolektis kun botanika celo. Profesoro David raportas, ke speco de vera tabako grandekvante kreskiĝas nekulturata sur ĉi tiuj plataĵoj. Tio kaj certa veneniga kreskaĵo estas la lastaj vegetaĵoj kiuj travivas severan sekecon, kaj tiampe estas mangataj de malsategaj brutoj kun fatalaj rezultatoj. Kvankam homoj povas sendanĝere maĉi la sovaĝan tabakon, bruto ĝin manĝinte suferas doloregan morton.

Plena raporto kiu rilatas precipe al la esploradoj faritaj pri la glacia fenomeno estis prezentita de profesoro David, al profesoro Kavaliro Baldwin Spencer, vic-prezidanto de la asocio por la progresado de la scienco. Tiu raporto poste estos publikigita.

Important Announcement to Progressive Students.

A number of Melbourne Esperantists enjoy a very exceptional advantage in being able to participate in translation exercises under the guidance of Mr. George Gordon, F.B.E.A., the translator of "Alegorioj el la Naturo," "Lia Lasta Ŝanco," "La Kamena Angulo" kaj "Kara Panjo." It is Mr. Gordon's desire that Esperantists throughout Australia, whether members of groups or isolated workers, should be enabled to go through the translation course. An English piece is set for translation each month. The translations are perused by Mr. Gordon, who compiles a paper dealing with the weaknesses and inaccuracies revealed by the translations sent in. Mr. Gordon also translates the set piece. For the Melbourne members the only expense is the cost of the necessary typewriting. Country and Interstate Esperantists may join by paying the small sum necessary for typewriting and sending stamped addressed envelopes for the set piece and for the return of their translation with the conductor's translation and notes. Those desirous of joining should send to the Secretary, "Suda Krucio Traduka Rondo," Box 1367, Elizabeth Street Post Office, Melbourne, one shilling (preferably by postal note), one addressed envelope, with a 2d. stamp affixed, for the set piece, and one addressed wrapper, with 2d. stamp, for the translations and note.

It is hoped that all earnest students of Esperanto in Australia and New Zealand will join this Rondo. Group secretaries and class teachers are requested to bring the Rondo under the notice of Esperantists who may not be subscribers to "Suda Krucio." Those Esperantists who were members of the "Traduka Rondo" in 1914-15 testify to the advantage they received and to the value of the information contained in the monthly notes. We hope that the kindness of Mr. Gordon in devoting so much of his time to this work will be fully appreciated. The best method of showing that appreciation will be by every earnest student in Australasia working in conjunction with him during the ensuing twelve months. Any

further information desired will be supplied by the Secretary on application.

Vivo.

I.

Mi certe ĝojas konatiĝi kun vi!

II.

Ĉu la luno ne estas belega?

III.

Nur unu pli, karulino!

IV.

Ĉu vi——?

Certe, mi——

V.

Pa-Pa-Pa-Pa-

VI.

Ĉa vi ne jam preparis la manĝaĵon?

FOR SALE, Rhodes's Dictionary, "Lilio." What offers? WANTED, "Marta," "Batalo de Vivo," "Revizoro." "Pakeha," Box 1367, Melbourne.

S-ino R. B. Bigelow, Kangaroo Road, Oakleigh, Victoria, deziras korespondantojn alilande l. p. k. i. Ĉiam nepre respondos.

F-ino P. Abbott, Willsden Road, Oakleigh, Victoria, deziras p. m., p. k. i. ĉiulande. Ĉiam tuj respondos.

At the Labor Party conference held at Wellington, N.Z., on 14th July, it was decided that the education platform should include the teaching of Esperanto as an auxiliary language.

Al Niaj Legantoj.

La Suda Krucio komencis vivi per donaco de la Tria Aŭstralia Kongreso en Sidnejo, Pasko 1920. Dum la unua jaro de ĝia vivo, ĝis julio, kiam la A.E.A. prenis al si la respondecon pri ĝi, la enspezo estis £101/16/6, kaj la elspezo £97/10/-. Tio estis por dekunu numeroj. La dekdua

numero, eldonita kiel duoblaĵo, numeroj 12 kaj 13), pliigis la elspezojn £104. Tio ĉi montras perdon la unua jaro. Ni kalkulas la elspezojn por la proksima jaro je £116. Ĉi postulas pli ol 500 abonantojn, ni havis por la pasinta jaro nur 400 abonantojn. Se ĉiu el ili reabonantojn kaj varbos pluajn abonantojn ni povos sukcesi, sed klare ĉi tio estas grava afero. Nuntempe ni posedas proksimume £25, kaj la elspezo £11/10/-. Tio lasas £13/10/-, sufiĉe por du pluaj eldonoj. Kion faros? Ĉu nia ĵurnalo vivos mortos? Subteno estas la plej grava afero nuntempe. Ni starigu ĉi tiun kapitalon por Suda Krucio. Ĉi donacojn ni feliĉe kvitancojn kaj petas ke ĉiu faru sian eblon.

Al Niaj Subtenantoj.

Ni ricevis la jenajn sumojn, abonantojn por la dua jaro, danko:—C. W. Ballard, 4/6; H. Skillman, 4/6; J. Doyle, N.Z., 4/6; J. Hodges, N.Z., 4/6; R. Bigelow, 4/6; H. V. Tilbury, 4/6; G. Redford, 4/6; — Cox, 4/6; A. R. Cohen, 4/6; W. M. King, N.Z., 5/-; B. K. Blyth, 4/6; E. A. Sinnotte, 4/6; M. Purvis, 4/6; M. Cohen, 4/6; — Hepworth, 4/6; W. Baltaglo, 4/6; L. Irwin, 4/6; R. Cottingham, 4/6; C. Dornbusch, Qld., 4/6; A. Greiser, 4/6; J. G. Wood, N.S.W., 4/6; E. McKenzie, 4/6; A. Parnell, 4/-; H. Warren, 4/6; G. Meyer, 4/6; W. L. Waterman, 4/6; W. E. Hill, 4/6; J. J. Tobin, 4/6; C. F. White, Glasgow, 4/6; Bro. Benedict, Glasgow, 4/6; Thompson, 10/-; Rev. R. T. M. B. Cliff, 4/6; C. L. Clarke, 4/6; W. G. L. E. Thompson, 4/6; W. T. Cane, 4/6; T. Tree, 4/6; C. Caine, 4/6; Steitz, 4/6; H. Leighton, 4/6; Saw, 5/-; C. McKenzie, 4/6; L. Evans, 7/6; A. Godfrey, 4/6.

Cole's Book Arcade, Melbourne

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne Street, Windsor.